V-19491/31 (1966)

*junio 1966*

# NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio*
*„La Estonto Estas Nia"* - *31- jara, n-ro 6*

*Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.*

*Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.*



E. de Wolf †

d1/84

# NEKROLOGO

## SINJORO E. DE WOLF KAJ EDZINO.

Amiko E. de Wolf mortis, kiel la redaktoro de nia organo povis ankoraŭ komuniki en la antaŭa numero de nia organo. La fidela esperantisto, kiun oni renkontis en preskaŭ ĉiuj jarkunvenoj kaj aranĝoj, kie liaj instigaj kaj modestaj paroloj estis ofte aŭdataj, kie li manipulis la magnetofonon, forpasis en la aĝo de 75 jaroj je la 17-a de aprilo pasinta. Grandaj estas liaj meritoj por la Esperanto-movado.

Plurajn jarojn li gvidis la lokan grupon en Harlemo, ĉefe kiel prezidanto; diversajn funkciojn li plenumis en la ĉefestraro; multajn jarojn li oficis kiel delegito de U.E.A. en Harlemo; kelkajn jarojn li apartenis al la komitatanoj de U.E.A. Li estis ekzemplo por multaj kun fiksa organiza kompreno, tial oni vidis lin en ĉiaj aranĝoj, kiuj celis la antaŭenigon de la L.E.E.N.-organizaĵo.

La daton de lia esperantistiĝo mi ne scias precize, sed estas certe, ke li eklernis la lingvon en la unua mondmilito kaj tuj li estis fervora membro de la loka grupo, kiun li servis jen kiel estrarano jen kiel longjara prezidanto. Multaj estas la lokaj aranĝoj, kiujn li iniciatis kaj en kiuj li iel, ofte modeste sed firme, laboregis.

El tiuj mi menciu:

1927 - 3a Nederlanda Esperanto-Kongreso en Harlemo;

1935 - Tritaga L.E.E.N.-kongreso;

1949 - Tritaga L.E.E.N.-kongreso; 40-jara jubilea aranĝo de la loka grupo;

1954 - 39-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun de Wolf iniciatis kaj kiu povas esti konsiderata la kulmino de la Esperanto-kariero; dum pli ol unu jaro li plenumis la sekretarian funkcion en la L.K.K.;

1959 - 6-a Beneluksa Kongreso; 50-jara jubileo de la loka grupo; laŭ Tyneverum (s-ro Vermuyten) li tie estis „la luma lampo";

1962 - Memoriga kunveno en Harlemo, okaze de la 75-jara ekzistado de Esperanto; s-ro de Wolf aranĝis kaj dejoris en la tie organizita ekspozicio.

Amiko de Wolf apartenis al tiuj malmultaj esperantistoj, kiuj scias ĉiam akcepti kun entuziasmo kaj fervoro kromajn funkciojn. Dum diversaj jaroj li modele gvidis gazetarservon; depost 1928 liaj ampleksaj raportoj (plurpaĝoj, dense presitaj) aperis en „Holanda Esperantisto". En 1932 oni elektis lin estrarano de L.E.E.N., kie li dejoris kiel prizorganto de la gazetarservo, (kelkmonate) kiel kunredaktoro de N.E., kaj en 1934 kiel sekretario de la ĉefestraro. En 1935 li eksiĝis el la L.E.E.N.-estraro, sed revenis en la jaro 1955 kiel dua sekretario kaj vic-prezidanto. Kiam la tiam elektita sekretario ne plenumis sian devon, li gvidis la sekretariejon; poste denove kiam la nova sekretariino malsanis. Akurate li prizorgis la protokolojn de la ĉefestraraj kunsidoj. En 1958 li akceptis la magnetofon-servon kaj sciis kapti diversajn interesajn bendojn; li verkis diversajn instigajn artikolojn, kolektis uzitajn poŝtmarkojn por la Mabesoone-fondaĵo, aranĝis la rondvojaĝon de la japano Itoo en 1959. Jam en 1960 la jarkunveno en Amersfoort nomis lin honora membro. Kelkajn jarojn li estis unu el la reprezentantoj de L.E.E.N. en la tiama N.C.K.E., krome komitatano de U.E.A. Li vizitis diversajn internaciajn kongresojn kaj aranĝis L.E.E.N.-karavanon al Oslo en 1952. En 1963 en jarkunveno en Utrecht li kortuŝe adiaŭis kiel estrarano de L.E.E.N. Laste li ĉeestis ĉe la 60-jara jubilea festo (septembro 1965), ankoraŭ sufiĉe vigla kaj entuziasma.

Tiuj, kiuj apartenis al liaj intimaj amikoj (mia edzino kaj mi havis la privilegion esti inter ili) scias ke lia edzino, kiu forpasis unu tagon post li, plene subtenis sian edzon en lia poresperanta laboro. En multaj aranĝoj oni povis renkonti ankaŭ ŝin; ŝi permane faris kelkcent flagetojn por ornami la tramojn dum la Universala Kongreso en Harlemo. Bedaŭrinde kormalsano katenis ŝin al la lito dum la lastaj jaroj; ŝia edzo fidele flegis ŝin. Kune ili formis paron por kiu validas la versoj de nia poeto J. v.d. Vondel (ĥoro de burĝoj, traduko de s-ro Isbrucker):

> Nenie fidelec'
> Pli ol en geedzec'
> Sincere korojn ligas;
> Animojn kiel arda fer'
> Forĝitajn kune ne disigas
> Ĝoj' nek mizer'.

„Fidela ĝis la morto" (ankaŭ rilate Esperanton) povas esti ilia epitafo.

Multaj personoj ĉeestis ĉe la entombigo,



# SCIINDAĴOJ EL LA HISTORIO DE NIA ASOCIO (IV)

Kvankam post la unua mondmilito evidentiĝis ke la Esperanto-movado devis suferi multajn perdojn, nacie kaj internacie, kelkaj fervoruloj tamen levis la torĉon kaj iom post iom rekomencis sian antaŭan agadon. El la Haga librejo stariĝis la „Centrale Esperanto-Boekhandel N.V." en 1919, kies akcioj estis la posedaĵo de multaj esperantistoj - la triono de la kapitalo estis antaŭpagita. Cetere oni invitis al Hago la 12-an Universalan Kongreson de Esperanto; prezidanto estis s-ro Isbrucker, sekretario J. L. Bruyn. Ankaŭ la nederlanda laborista movado partoprenis kaj kaptis la okazon por revigligi siajn peresperantajn idealojn.

Anoncis sin 408 personoj el 27 landoj. La nederlanda registaro por la unua fojo sendis reprezentanton (depost 1922 ĉiujare s-ro Isbrucker oficiale reprezentis nian registaron en la Universalaj Kongresoj, raportinte poste al la koncerna ministro).

Kvankam la gazetaro sufiĉe bone interesiĝis pri la kongreso, la nederlandaj organizoj ne povis akiri novajn adeptojn. Monmanko devigis F.L.E. ĉesi la eldonon de propra organo kaj ĉar L.E.E.N. same ne dronis en la mono, oni decidis kune transpreni la organon „Nederland-Esperanto", kies redaktoro fariĝis s-ro A. Kloek; kompreneble nia asocio finis la eldonon de „La Holanda Pioniro". Intertempe fondiĝis en Den Helder nova grupo, kiu aliĝis al L.E.E.N., dum nia nestoro, s-ro J. V. Holleman, kune kun kelkaj aliaj, fondis sekcion en Bergen op Zoom; ĉi tiu grupo tuj rikoltis la favoron de la urba estraro, akirinte senpage ĉambron en malnova lernejo por siaj Esperanto-kursoj.

La financaj rimedoj de ambaŭ organizoj tamen ne sufiĉis por daŭrigi la eldonon de komuna organo (kies nomo en 1922 ŝanĝiĝis en „Holando Esperantisto"). La redaktoro A. Kloek, kune kun C. G. Sterkenburg, proprariske daŭrigis la eldonadon; la koncerna gazeto restis dum multaj jaroj la oficiala komunikilo de ambaŭ organizoj (de F.L.E. ĝis 1928, de L.E.E.N. ĝis 1-1-1932), sin nutrante nur per la abonoj de unuopaj esperantistoj; tamen ĝi estis iu ligilo kaj sekve s-ro A. Kloek meritis la dankon de la nederlanda movado en malfacilaj jaroj.

En 1924 la radio por la unua fojo disaŭdigis radio-prelegon fare de s-ro Isbrucker, dum en la jaro 1925 la tri nederlandaj asocioj ankaŭ unuafoje trovis unu la alian. Kune ili organizis la unuan Nederlandan Esperanto-Kongreson en Hilversum (31 majo, 1 junio); en solena kunsido Dreves Uitterdijk tie ricevis la honoran titolon „La Holanda Pioniro".

Fondiĝis en Almelo nova grupo (5 majo 1925), same kiel en Groningen.

Intertempe iu s-ro J. van Hengel eldonis propagandan gazeton „Wereldtaal", kies redaktoro fariĝis Dreves Uitterdijk ('24). Sed tiu eldoninto en 1925 montris sian veran vizaĝon, kiam li publikigis apud la ekzistanta „Holanda Esperantisto", kies administranto li estis, novan organon „La Holanda Esperanto-Pioniro", misuzante tiel la abonantaron de la unua gazeto. Tiu parazito, ĉar tiel oni fakte devas nomi tiajn personojn, kiuj de tempo al tempo aperas en la movado kaj nutras sin per la atingaĵoj de la organizoj, sciis allogi al si multajn naivajn esperantistojn; dum mallonga tempo „Holanda Esperantisto" eĉ ne povis aperi. Van Hengel elpoŝigis multan monon el la monujo de la esperantistoj por siaj ĥimeraj ideoj, fondis apartan nederlandan asocion, propran presejon, universalan spezmilan bankon, ktp. sed neniel plirespondis siajn akiritajn monsumojn. Fine li bankrotis en la jaro 1927, sed li kaŭzis multan domaĝon al la nederlanda movado; la organizoj perdis multajn membrojn, kiuj seniluziiĝis, kaj multaj esperantistoj, i.a. Dreves Uitterdijk, neniam rericevis la pruntitajn sumojn.

Feliĉe nia asocio havis en tiuj jaroj firman estraron, kies prezidanto estis s-ro H. J. Blokker, dum s-ro H. S. Donker funkciis kiel sekretario. La unua dum multaj jaroj kunredaktis „Holanda Esperantisto" kun s-ro A. Kloek (dum s-ro A. de Vries, nun en Soest prizorgis la administradon); la dua estis bonega organizanto, kiu brave staris sur la remparo por defendi la neŭtralan Esperanto-movadon en nia lando, kvankam L.E.E.N. nombris fine de decembro 1926 nur 10 sekciojn kun proks. 340 geanoj.

*(daŭrigota).* **P. M. Mabesoone.**

*La antaŭaj partoj aperis sinsekve en „N.E." (1966) de marto (I), aprilo (II) kaj majo (III).*

***SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON!***

*Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen. Poŝtĝirkonto: 81 58 89.*

# KONCIZE

**Muzika komedio de Karel Ĉapek.**

La en Nederlando konata Ĉeĥo Karel Ĉapek iam verkis kune kun sia frato muzikan komedion kun la titolo „El la vivo de la insektoj". Antaŭ ne longe ĝi kun sukceso estas prezentita en Munkeno de la aktoraro de la nacia teatro de Praha. Karel Ĉapek konatiĝis ĉe la nederlandaj Esperantistoj pro sia ĉarma verketo „Skizoj pri Nederlando", el la ĉeĥa tradukita de G. J. Degenkamp kaj eldonita de la Libroservo F.L.E.

**Disertaĵo en Esperanto.**

S-ro Aŝvinikumar', hinda studento en Amsterdam, intencas en la dua parto de tiu ĉi jaro doktoriĝi en la universitadto de Amsterdam per disertaĵo pri „La Intuiciisma Teorio de Hilbertaj Spacoj". Li ricevis permeson de la universitataj aŭtoritatuloj publikigi sian disertaĵon ankaŭ en Esperanton, tiel ke lia disertaĵo aperos kaj en la angla kaj en Esperanto, kun resumo en la nederlanda lingvo.

**OREBRO - LA URBO KAJ GUBERNIO**

Tio estas la titolo de nova, grandformata faldfolio en Esperanto eldonita okaze de la 700-jara jubileo de la guberniurbo en la bela provinco Nerke en la mezo de Svedujo. Du mapoj en agrabla kolorpreso okupas la plej grandan parton de la faldfolio: unu mapo tre detala kaj same klara pri la urbo Orebo, kaj alia pri la tuta gubernio.
Mendu la senkostan faldfolion ĉe: *Turisbyrän, Gamla Teatern, Storgatan 1, OREBRO, Svedujo.*

En Ĉeĥoslovakio fondiĝis **Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato,** kiu de nun fariĝas oficiala reprezentanto de junulara esperantista movado en ĈSSR. Adreso: Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato, PRAHA 2, Blanická 4, Ĉeĥoslovakio.

**GRAJNOJ EN VENTO.**

Okaze de la 10-jara datreveno de la interlernejaj rondoj internaciaj „GRAJNOJ EN VENTO" (1956-1966) ni ricevis kajeron n-ron 95 (de 10-2-1966) kun verkaĵoj de gelernantoj el 21 landoj, i.a. Sovjet-Unio kaj Usono.
La organizanto estas s-ro Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, BIENNE BIEL 7, Svislando.
Celo de GEV: Kulturaj interŝanĝoj inter infanoj, kontribuo de infanoj al paca tutmonda kunlaboro, Esperanto en la lernejojn!

## ĈU HISTORIO INTERESAS VIN?

La - bedaŭrinde nur kvar - fakdelegitoj de UEA pri historio interkonsentis fine de januaro 1966 en neformala INTERNACIA HISTORIISTA FAKGRUPO (IHFG) diskuti historion, instruadon pri historio kaj surbaze de reciproka subtenado publikigi historiajn studojn en la Internacia Lingvo. La komence transprenitaj taskoj de la fakgrupo estas: difinado de historiaj nocioj kaj kompilado de terminaro (eventuale en formo de historia leksikono), kompilado de bibliografio pri faŝismo kaj fine preparado de eldonota historiista bulteno kaj eventuale historiistaj kajeroj.
La anoj de la IHFG alvokas ĉiujn personojn kiuj scipovas la Internacian Lingvon kaj aŭ estas profesiaj historiistoj aŭ hobie okupas sin pri historio (kaj ĝin rilatantaj aferoj) kunlabori, ĉu konstante, ĉu en iu difinita programero. La IHFG-anoj salutas ĉiajn instigojn kaj atentigojn ekz. pri terminologiaj problemoj, bibliografiaj indikoj, diskutindaj temoj ktp.!
La korespond-adreso de la Internacia Historiista Fakgrupo estas: D-ro E. J. Görlich, Postfach (poŝtfako) 70, 1094 WIEN, Aŭstrio.

D-ro E. J. Görlich, Wien, Aŭstrio
F. Roose, Brugge, Belgio
G. Véron, Domfort, Francio
U. J. Moritz, Münster, Germanio

KUL